TEA-BULTENO

12ª JARO | **MARTO - APRILO 2009** | **NUMEROJ 3-4**

Limoj ne ekzistas, nek al pensoj, nek al sentoj. Limojn kreas nur timo.
Ingmar Bergmann, sveda reĝisoro (1918-2007)

Kara Legantaro!

Pri kio plej ofte mi fanfaronis kaj distrumpetadis dum mia plurjara redakto-okupiĝado, estis la fakto, ke tre akurate, ĝustatempe, antaŭ ol … tuj, mi sukcesis aperigi TEA-Bultenon, fine de ĉiu dua monato. Nu, modesta asocia informilo, sed se eventuale ĝia enhavo ne kontentigis postulojn aŭ pretendojn viajn, almenaŭ ĝi havis iun notindan econ: la akuratecon. Tiun ĉi ideon ennajlis en mian menson tre kara amiko, jam pli ol dek jarojn malaperinta: Aldo Viotto. Estante lia kunlaboranto en la redaktado de LA ETA GAZETO, mi ensuĉis, eĉ senaverte, tiun preskaŭ militistecan (aŭ mezeŭropecan!?!) pensmanieron. En tiuj tempoj al nenio ni permesis malhelpi aŭ malebligi, ke ekspedo de la gazeto okazu plej malfrue tri-kvar tagojn antaŭ la fino de ĉiu monato: nepris ke leganto havu ĝin enmane je la 1ª tago de la sekva. Nek malsano aŭ tag-nokta deĵorado, nek tertremo aŭ ŝtormado, nek ferioj transkontinentaj estis kialoj por malobei tiun firman regulon. Kaj tiu akurateco iĝis preskaŭ devizo por ĉiuj kunlaborantoj. Dum dek jaroj fiere ni restis fidelaj al tiu principo, tiom ke post malapero de LA ETA GAZETO kaj ekesto de TEA-Bulteno, dum pli ol 12 jaroj, mi klopodis respekti ĝin.

Sed - ho, ve! - kia bato por mia orgojlo! Cindron mi metas sur mian kapon, surgenue mi iradas petante vian pardonon! Ja du semajnojn pasis de post la unua de marto kaj ankoraŭ la bulteno, malnete, estis kuŝanta enkomputile.

Ĉu vi deziras ekscii la kialon de tioma malfruo? Jen ĝi: granda kaj grava evento baldaŭ okazos en Triesto, ni ĉiuj streĉe laboradas por ĝi: Fervojistaro tutmonda atendas senpacience la inaŭguran momenton de la 61ª INTERNACIA KONGRESO, en la jubilea jaro de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio.

Ho, mi trovis tre bonan pretekston, ĉu ne? Sed kiun pretekston **VI** trovos por ne veni al Triesto, por ĉeesti tiun eksterordinaran eventon, en periodo plej favora, de la 23ª ĝis la 29ª de majo, kiam printempo vestos ĉi urbon per la plej bele bunta vesto, kiam ĉielo kunfandiĝos kun la adriatika maro en ia blua tuto, kiam la suno varme brilos, sed ne brulos via haŭto: la milda briza triesta vento karesos vin, donante plezuran freŝecon kiam viaj koroj flamos ekzalte pro la ĝojo festi kune kun amikaro la 100-jariĝon de la Fervojista Federacio!

Do, klarigita la kialo de malfrua redakto. Ni frenezaritme kun iom da aritmio preparas programojn, esploras ĉiajn plej bonajn eblojn por ke la venontaro sentu sin en Triesto kiel ĉe propra hejmo, por ke la semajno kiun ili pasigos ĉi tie estu densa je interesaj kaj allogaj kulturprogrameroj, por ke la turisma parto estu tiel neforgesebla, ke nura deziro, je ĉies hejmeniĝo, estu: reveni ĉi tien!

Triesta LKK vin atendas: estas ankoraŭ tempo por aliĝi kaj ne maltrafi okazaĵon, kiu certe gravuriĝos en koroj kaj mensoj de tiuj kiuj bonŝancos partopreni en Triesto, en la

61ª Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso,
en la Jubilea jaro de IFEF.

Atendas vian tujan aliĝon,

plenfide via Elda

Al TEA-anoj!

Dum la venontaj monatoj en TEA-sidejo okazos neniu programo, ĉar ni devas nin dediĉi al programado kaj organizado de la kongreso: estas tempo do, por … nenio alia ol la kongreso! **Ĉiu-marde kaj –vendrede ekde la 19ª horo ni renkontiĝas** por kune labori, prepari, plani, diskuti ktp. Okazos pluraj ekskursoj dum la kongreso kaj post ĝi: oni devas sin prepari por akompani la gastojn al Kastelo Miramare, al tiu de Duino, al Fervoja Muzeo, al Aquileia kaj Grado kaj al Cividale kaj Udine, al Giganta Groto, Monrupino, Muggia, ktp ktp. Dum la semajno oni devos ĉiĉeroni, laŭ jam preparitaj itineroj, tra la urbo. Gvidantoj devos sin prepari por priskribi la vidindaĵojn en Bona Lingvo, do endas klopodi kiel eble plej ekzercadi sin esperantlingve, ĉar la partoprenontoj estas ĉefe eksterlandaj, italan lingvon aŭ triestan dialekton oni ne komprenos! Jen eksterordinara okazo por pliperfektigi viajn sciojn kaj plifluigi vian elparolon, krom konatiĝi kun interesaj homoj, venantaj el pluraj landoj eŭropaj kaj eĉ el Ĉinio.
Do, ni atendas vin ĉe TEA-sidejo multnombraj en la kutimaj tagoj kaj pretaj akcepti vian kunlaboron, helpon, sugestojn, ideojn …

ĈU LINGVOPROBLEMO?

Nuntempe kaj eĉ pli dum la lastaj semajnoj, ĉiuj telejurnaloj, kvazaŭ vulkanoj, elĵetas terurigajn informojn: katastrofojn, naturajn aŭ homdevenajn, tutmondan financan krizon, malpliigon de MEP (malneta enlanda produkto), kreskon de senlaboruloj, perfortojn kaj aliajn similajn … plezurigaĵojn. Kaj ni ŝajnas malgrandaj homoj senpovaj kontraŭ tiuj, samkiel niaj praavoj kontraŭ la fulmoj de Zeŭso el la supera Olimpo.

La plimulton de tiaj okazaĵoj, eĉ tiuj naturaj, originas la homa konduto, ankaŭ kiam ŝajne ne tiom evidentas la interrilato.

Sed iuj havas tute klaran homan kaŭzon. Ekzemple la perfortoj: kontraŭ aliaj homgrupoj, raboj al unuopuloj, kontraŭ infanoj, virinoj, tiel oftaj hodiaŭ – aŭ almenaŭ tiaj al ni prezentas la amaskomunikiloj. Sociologoj, psikologoj, psikiatroj per pluraj debatoj nuntempe pruvis rilaton de perforto – eksplodanta inter la hodiaŭa junularo, evidentigita ne nur de la krimaj faroj sed ankaŭ ĉeesta en ties sintenoj, kondutoj, preferoj, pli precize en ties ĝenerala aroganteco – kun perdo de identeco ĉe unuopulo: kiam homo ne plu havas certajn valorojn, kiam neniiĝas liaj radikoj – asertas la kleruloj – li restas sola en la cirkaŭanta socio kaj emas sin turni al perforto, pli-malpli altnivela, por retrovi sin mem, por evidentigi propran personecon.

Do: ĉu vere hodiaŭ homo perdis identecon, sentas sin sola? Kiel eblas en nia societo tiom riĉa je ĉiaj eblecoj, en konsumisma formo, en distraĵa kampo, kie loterioj abundas?

Ne forgesu, ke inter la alstrebataj konsumvaroj troviĝas komputiloj, poŝtelefonoj k.s., iloj favorantaj izoliĝon de homo ene de la societo mem.

Ne forgesu la ĉiam pli ŝvelantan tutmondiĝon, kiu ebligas – aŭ devigas? – transporti varfabrikadon de unu lando al alia cele propran profiton: tiamaniere subite malaperas okupo por la jam plurjare laborantaj uloj, kies tuja efiko estas perdo de memestimo kaj sekve de identeco, sen konsideri la ekonomiajn konsekvencojn en propra aŭ familia vivtenado.

Pro la sama ĉiam pli ŝvelanta tutmondiĝo homoj, celantaj pliboniĝon de siaj vivkondiĉoj, elmigras de sia al alia lando, kie ili devas unue alfronti la lingvobaron, kiu transiras la simplan akiron de gramatiko, vortoj, esprimoj: necesas, inter alie, lernado de "kodoj" de l' nova idiomo, tiu aro da normoj por integriĝadi en la nova medio. Sed restas emo uzi normojn de la origina kulturo, kaj de tio devenas miskomprenoj, kroma kialo de izoliĝo.

Tutmondiĝo estigas ankaŭ emon al scipovo de komuna komerca lingvo: la reganta angla. Per plej diversaj sistemoj, ekde simplaj lernokursoj (tre profitodonaj por instruantoj kaj instruistoj), ĝis eksterlanda restado (tiu fama *"full immersion"* kiu havigas al Britio mezume po 900 eŭroj jare por eŭropano), aŭ enkonduko en Universitatojn kaj Altlernejojn de studobjektoj anglalingve instruataj, kies rektaj sekvoj estas malriĉigo de la koncernaj kulturoj, precipe sciencaj, kaj estigo de unuopula, malsupereca komplekso. Tiun sistemon Robert Phillipson – fama dana profesoro, aŭtoro de kompleta studaĵo, tradukita esperantlingven de István Ertl kun la titolo "Ĉu nur-angla Eŭropo?" (UEA, 2004) – difinis <*lingua cucula*>, lingvo de l' kukoloj, laŭ la kutimo de tiuj birdoj anstataŭigi per la propraj ovoj tiujn en nestoj de aliaj specoj.

Ĝis invado de la mondo far tiuj piĝinoj kiel *japlish* (japana plus angla) aŭ *italiese* (itala plus angla) kaj multaj aliaj. Ĝis teorigo de *Globish*, ege simpligita angla, kiu certe helpus interkompreniĝon, sed povus limigi la evoluon de personeco, normale disvolviĝanta per kaj dank' al lingvo, ĝis fina perdo de eĉ identeco.

Se veras la konkludaj raportoj de l' kleruloj, laŭ kiuj vere perforto rilatas al tio, ankaŭ lingvo grave rolas en tiu afero.

Viglo

Il Bel Paese dove l'okey suona

Ma l'Italia è ancora il «bel Paese là dove 'l sí suona»? Oggi Dante dovrebbe scrivere che l'Italia è «Il bel Paese dove l'*okey* suona».

Passivi, e talvolta conniventi, stiamo assistendo a una crescente corruzione, a un progressivo imbarbarimento, a un deleterio imbastardimento delle lingua. Col colpevole avallo - e spesso per iniziativa - di chi la lingua dovrebbe difendere, ovvero le istituzioni, da cui provengono esempi davvero poco edificanti. Che necessità c'era di introdurre *welfare* per "stato sociale", *premier* per "presidente", *social housing* per "case popolari", *election day* per "giornata elettorale", *social card* per "tessera sociale" e via inglesizzando?

Si tratta di una tendenza che denota una forma di provincialismo e di ossequio verso il potere, politico e soprattutto economico, da parte di chi, oltre tutto, dimostra di conoscere male sia l'italiano sia l'inglese, altrimenti saprebbe usare l'esatto corrispondente nella nostra lingua del termine straniero. Pigramente accondiscendenti, i mezzi d'informazione fungono da amplificatori e da supporto - quando non sono essi stessi la fonte di orribili ibridi linguistici - a una sopraffazione linguistica subdolamente imposta e supinamente accettata.

Difendiamola, la nostra lingua. Difendiamola, finché c'è ancora qualche speranza. Non li stiamo a sentire quei sedicenti studiosi che continuano a sostenere che è sempre successo. Certo ci sono sempre stati nel passato scambi linguistici fra lingue diverse o appropriazioni di vocaboli che generalmente non avevano un corrispondente e si è trattato quasi sempre di arricchimenti. Ma oggi - con l'ausilio anche dei potenti mezzi di comunicazione di cui disponiamo - vediamo la lingua italiana perdere terreno sotto i nostri occhi, giorno per giorno, ora per ora, fagocitata dall'inglese, in una inutile, stupida, deleteria gara a chi piú riesce a inserire anglismi.

In passato abbiamo importato (e comunque in un processo lento e costruttivo) dei termini in genere insieme con ciò che essi indicavano, come è successo con "sport", "film" e simili. Ma che senso ha dire oggi *step*, per indicare un passo, un gradino, uno scalino, vocaboli che abbiamo sempre avuto? Perché dire *step by step* invece di "man mano", "gradualmente"? Non c'è altro motivo che quello di un malinteso sentirsi alla moda. O, come si sente dire, di sentirsi *trend*.

Amerigo Iannacone
Il Foglio Volante—marzo 2009

Rakontu al mi fabelon...

Fabelo el Afriko: la vantema ĝirafino

Rande de granda arbaro Afrika, vivis, inter aliaj bestoj, belega ĝirafino, svelta kaj lertmova, alta pli ol ĉiuj aliaj. Ŝi konsciis, ke ne nur ŝia ĉirkaŭanta kunularo admire gapis al ŝi, sed ankaŭ ĉiuj aliaj loĝantoj de tiu arbaro. Tial, pli kaj pli, ŝi iĝis malmodesta, neniun alian plu respektis, eĉ refuzis helpon al petantoj. Dum la tuta tago ŝi pave paradis por montradi sian belecon al tiuj kaj tiuj ĉi, dirante: "Rigardu min, mi estas la plej bela!"

Pasis la tempo, kaj la aliaj bestoj, fine teditaj de tiaj vantaĵoj, ekridindigis ŝin, sed tiu malhumila ĝirafino estis tro okupita admiri sin mem kaj malatentis tiujn mokojn, ankaŭ ĉar envere ŝi ne rimarkis la sarkasmon en iliaj komentoj. Iun tagon simio decidis instru-admoni ŝin. Li komencis flati la ĝirafinon per vortoj delikataj kiel malpeza plumo, kiuj milde karesadis ŝiajn orelojn. "Ho, kiel bela vi estas! Kaj kiel alta! Via kapo etendiĝas tiel alten, kien neniu alia besto sukcesas." Kaj tiel parolante, li ŝin altiris al iu granda palmo.

Apud tiu ventumilforma arbo, la simio petis ke ŝi prenu por li la daktilojn troviĝantajn sur la palma plejsupro, kiuj – laŭ li – estis la plej dolĉaj, la plej gustumindaj. La ĝirafina kolo estis longa, longega, sed malgraŭ streĉa strebado ĝin plilongigi, la fruktoj restis nekapteblaj. Tiam la simio, unusalte, grimpis ŝian dorson, poste ŝian kolon kaj fine levis sin al la kapo, de kie li sukcesis pluki la deziratajn fruktojn. Alteriĝinte, li tiel alparolis la ĝirafinon: "Vidu, mia karulino, vi estas la plej alta, la plej bela, la plej … ĉio, sed neniu povas vivi sen la aliaj, ni ĉiuj bezonas unuj la aliajn." Feliĉe, la ĝirafino komprenis la lecionon kaj ekde tiam komencis kunlabori kun la aliaj bestoj kaj ĉefe lernis ilin respekti.

Triesto kaŝita

Histoririĉa kolono

En la placeto antaŭ la sonorilturo de Katedralo Sankta Justo staras kolono, tre bone konata de ĉiuj triestanoj, kiuj - laŭ propra kutimo - donis al ĝi la nomon "Kolono de l' melono" (*la colonna del melòn*). Tiu "*melòn*" origine estis ornama pinkonuso, lokita sur la pinto de la sonorilejo Sankta Justo.

En la 14ª jc, trafita de fulmo, ĝi teren frakasiĝis kaj dum jarcentoj restis tie, piede de la sonorilturo. Vero estas, ke efektive ĝi similis al melono: por certiĝi pri tiu vero, eblas ankoraŭ nun ĝin "admiri" en la enirejo de la Ŝtongravuraĵa Muzeo. Nuntempe sur la supro de la kolono staras ŝtona globo, tute malsimila al la origina modelo.

La kolono estis starigita en 1560, centre de la malnova Granda Placo (nuna Placo de Unuiĝo de Italio, *Piazza dell'Unità d'Italia*), vid-al-vide de la ne plu ekzistanta Preĝejo Sankta Petro, por plezurigi Ferdinandon la Unuan, fraton de Karlo la Kvina, okaze de lia veno al Triesto. La urbaj instancoj ordonis reutiligi iun malnovan kolonon, kiu estis starigita - antaŭ ĉirkaŭ 50 jaroj - de venecianoj en tiu sama placo, kaj, por la vizito de la eminentulo, ties supro estis ornamita per impona imperiestra aglo el nigra marmoro. La rezulto estis eksterordinara.

En 1783 tiu kolono estis translokigita de la francoj, kiuj mallongatempe okupis la urbon, pro trafikaj kialoj (jam en tiu tempo tiaj problemoj!), sed ankaŭ la bela marmora aglo estis forigita. Tiurilate ekzistas eĉ skribita ordono (1810) de tiama napoleona magistrato, Karlo Federiko de Ossezky, per kiu li sankciis la neniigon de tiu habsburga simbolo.

En 1843 oni decidis restarigi tiun kolonon en la nuna placeto, sed ĉi foje sen aglo ĉe ties supro, sed nur iu ŝtona globo surhavanta la urban simbolon, la Halebardon. Interese estas ke la placo estis farita sur parto de tereno apartenanta al familio Pillepich, kaj ke tiu kolono staras precize sur tre malnova puto, kiun - laŭ historiaj kronikoj - oni priskribas tre profunda.

Ankoraŭ alia kuriozaĵo: sub tiu placo disradias tuta serio de kanaloj kaj kanaletoj, kiuj probable formis parte la sistemon de sekretaj pasejoj, elirantaj de la kastelo Sankta Justo kaj kondukantaj enkore de la malnova urbo. En iu el tiuj pasejoj, dum subtera esplorado, estis malkovrita la antikvaj instalaĵoj por gase lumigi la preĝejon Sankta Justo.

Finfine ankaŭ en Triesto la pianisto Andrei Korobeinikov!

La Kulturasocio FRIEDRICH SCHILLER, kunlabore kun TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO, invitas vin ĉiujn al koncerto okazonta

dimanĉon la 22ª de marto, je la 17h30

en la teatra salono BEETHOVEN, via Coroneo 15

En programo, muzikoj de Johan Sebastian Bach kaj Ludwig van Beethoven.

Andreo naskiĝis la 10-an de julio 1986 en la urbo *Dolgoprudnij* de la Moskva regiono. Estante 5-jara, li komencis pianludi. Ekde la 7-jara aĝo li komencis gajni premiojn en diversaj muzikaj konkursoj. Andreo jam koncertis en Italio, Francio, Germanio, Japanio, Kroatio, Ĉeĥio, Svedio, Finnlando, Nederlando, Usono, Ĉinio, Hindio, Ukrainio, Azerbajĝano, kaj multaj urboj de Rusio; inter ili – koncertoj en la plej prestiĝaj haloj de la mondo.

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

100 jaroj de Esperanto en Triesto

Publika prezentado de la libro

CENTO ANNI DI ESPERANTO A TRIESTE

okazos merkredon 15an de aprilo 2009, je la horo 18ª ĉe *Caffè San Marco*.

Ĝin priskribos prof-ino Gabriella Valera Gruber. Ni varme petas vin ĉeesti multnombraj!

Ridu sanigas

Pago al kuracisto

Peter Goldberg sentis doloron ĉe la koro kaj vizitis la kuraciston.
Kuracisto: "Kion vi drinkas?"
Peter: "Du botelojn da Oporto-vino dumtage kaj ankaŭ unu botelon da biero."
Kuracisto: "Fumas?"
Peter: "Jes, mi fumas cigaredojn dum la tuta tago kaj ne malofte ankaŭ dum la nokto."
Kuracisto: "Sinjoro Peter, vi devas ĉesi drinki kaj fumi. Tio estas mia sola konsilo."
Peter: "Dankon al vi kaj saluton, doktoro."
(Peter deziras forlasi la ĉambron)
Kuracisto: "Bonvolu pagi al mi 5 zlotojn por la vizito." Peter: "Vi eraras, sinjoro doktoro. Mi tute ne intencas akcepti vian konsilon."

Bonstata (?) bopatro

Iom post la geedziĝo kunpromenas la komercisto kaj lia nova bofilo en la strato apud la borsejo.
Subite li diras al la junulo: "Ĉu vi vidas tiun ĉi altan rufharulon? Mi ŝuldas al li 10,000." Pasas kelkaj minutoj kaj li diras al sia bofilo: "Rigardu tiun ĉi ventrohavan etulon. Al li mi ŝuldas 15,000."
Post momento, denove: "Tiu ĉi maljuna malbonulo, kiu staras ĉe la ombro - mi havas 20,000 kiujn li pruntis al mi." Miregis la bofilo kaj demandis: "Paĉjo, eble anstataŭ ol rakonti al mi pri tio, kion vi ŝuldas, vi rakontu al mi pri tio, kion vi posedas?" Respondis la bopatro: "Tutegale, mia filo. Ĉio, kion mi ŝuldas, estas tio, kion mi havas."

ANAGRAMO (3,6 = 9)

Per la donitaj difinoj, trovu du aŭ pli da vortoj: la solvo malkaŝiĝos, se oni kunmetos ĉiujn ties literojn. Interkrampe, nombro de literoj de la unuopaj vortoj.

Interna lumo
Ne ekstere situas
gvido al fideluloj,
kaj ilin amikigas
ĝin parolante.

DUSENCAĴO: Trovu vorton, kiu havas du malsamajn signifojn. (4-litera)

Nekredeble !!
Malgranda elstaras
surkape de l' birdo,
krome ege sonoras
proksime al krucvojo.

VOKALŜANĜO: Trovu la unuan vorton, el kiu, per nura ŝanĝo de ajna vokalo, formiĝu la dua.

Specifa produkto
Rezulto de l' homa laboro
– eĉ supron de artaĵo ĝi atingas –
kiam ĝi entute ne estas
gravega ĉefkonstruaĵo.

Solvo de la enigmoj, en la venonta Tea-Bulteno

RAYMOND SCHWARTZ

LA STRANGA BUTIKO

La diversaj aĝoj de l' homo

En supra ĉambro, lulo ... lulo ...
Anĝele dormas la etulo:
Etaĝo.

Sed baldaŭ li el dorm' sin ŝiras
Kaj pri la bela mondo miras:
Miraĝo.

Jam ne plu side li tamburas,
Sed tra la dom' esplore kuras:
Kuraĝo.

Kun vundoj li (kaj sen rubandoj)
Revenas el stratbubaj bandoj:
Bandaĝo.

Kaj baldaŭ sekvas li kun ĝojo
Knabinon ĉien sur la vojo:
Vojaĝo.

Al ŝi li donas sian nomon:
Por fondi kune novan domon:
Domaĝo.

Li tiam estas tre utila
Fortika viro, kvankam vila:
Vilaĝo.

Kaj post rapida tempopaso
Postrestas nur senviva maso:
Masaĝo.

P. S.

Ni ne apliku al Virino
Ĉi tiun viv- kaj rimo-saĝon,
Ĉar de l' komenco ĝis la fino
Ŝi ĉiam havas saman aĝon:
Avantaĝo.

ELENA BULLO SANTI

(el Venecio)

Katino Leona

Kiu estas pli bela ol Leona
mia kara flava katino?

Velura haro, fortaj kruroj,
verdaj okuloj: jen la vigla mieno.

Dum mi atente skribas
per la komputero, la katino
kvieta apud mi ronronas.

Sed iafoje tro alta estas
kaj tro hela la varma suno.

Intence Leona min rigardas
ion petinda. Jes, mi komprenas.
Tiel mi preferas la utilon fermigi.

Liberaj ni povas kune eliri:
sur la molaj novaj herboj
de nia verda friska herbareto
niajn piedojn ni metas:
kiel viglaj knabinoj
ludantaj, ni povas kuri amuze.

05.04.2008

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo: Via Coroneo 15 - Trieste - marde-vendrede 19-21 horoj
tel/fakso: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
Grupa ttt-ejo://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
Poŝta adreso: CP 601 Trieste Centro IT-34132 Trieste - Italio
Poŝtĉekkonto N° 10834349

Precize, antaŭ 100 jaroj!

LEIPZIG, la 15 an de marto 1909. (Germanujo) Nr. 6, I.

La Spritulo

Internacia sessemajna gazeto por ŝerco, humoro kaj satiro.

Laŭtempa averto.



Trofidemulo: Vidu vilaĝano, kiel rapidege kaj riĉege la arbo kreskadas; jam nun mi ĝojas pri la dolĉaj refreŝigaj fruktoj, kiujn ĝi alportos.

Singardemulo: Ho jes, ankaŭ mi ŝatas la sukan fruktaron kiel helpo kaj bonfaro; sed zorgu ni ĝustatempe, ke la arbo ne plimalgrandigu per sia ombro la grenorikolton, al kiu ni ŝuldas nian panon kaj vivsubtenon.

Uno per tutti … cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina
senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il 5 per mille dell'imposta stessa a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

Come fare ?
È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2008 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

numero di codice fiscale dell'Associazione Esperantista Triestina

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Il Presidente
(Edvige Ackermann)

Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320
Associazione Esperantista Triestina C.F. 90012340320